"En du rangojn" interrompis la Falsa Kelonio "da fokoj, kelonioj, k.c. Poste, kiam oni formovis ĉiujn meduzojn——"

— "Kio ordinare konsumas multe da tempo" intermetis la Grifo.

— "Oni du fojojn antaŭen iras——"

— "ĉiu kun sia kundancanta omaro" — ree interrompis la Grifo.

— "Kompreneble" konsentis la Falsa Kelonio—"du fojojn antaŭen iras, turniĝas kun la kunulo——"

— "Ŝanĝas la kunulon kaj reiras samvice" diris la Grifo.

— "Poste" la Falsa Kelonio rekomencis "oni ja ĵetas la——"

— "la omarojn" ekkriis ekscitite la Grifo, kaj saltis en la aeron.

— "Kiel eble plej malproksimen en la maron——"

— "Naĝsekvas ilin" la Grifo kriis, ankoraŭ pli ekscitite.

— "Renversas sin en la maro—" dirante tion eĉ la Falsa Kelonio saltis furioze sur la piedpintoj.

— "Denove ŝanĝas la kunulon—" Ĉi tiun fojon la Grifo tiel forte kriegis, ke ŝajnis al Alicio ke ŝiaj oreloj krevas.

— "Renaĝas al tero, kaj—jen la fino de l' unua movado" diris la Falsa Kelonio. En tiu mo-



mento li subite mallaŭtigis la voĉo
bestoj kiuj ĵus freneze ĉirkaŭsalti
kaj rigardis Alicion trankvile kaj tr

"Ĝi nepre estus tre plezuriga
rigardi" diris Alicio.

"Ĉu vi volus vidi iometon da ĝi
la Falsa Kelonio.

"Ho, mi tre ŝatus ĝin" respondi

"Ni do tradancu kune la unuan
la Falsa Kelonio al la Grifo, "la
povos imagi. Kiu el ni kantos la

"Ho, *vi* kantu" diris la Grifo "ĉ
la vortojn."

Ili do komencis danci ĉirkaŭ
malofte, pro tro apudaj paŝoj, ili
ŝi la piedfingrojn. Ambaŭ mark
svingante la dekstran antaŭpieda
malrapide, tre triste la Falsa Kelo

*"Ho, Limak', vi plirapidu!" la merlango*
*"Ĉar fokeno post ni sekvas, kaj la voston a*
*Kelonioj kaj omaroj je fervoro ĉiuj bolas,*
*Kaj atendas vin sur sablo! Ĉu vi ankaŭ*
*Vi konsentas, ĉu ne vere? Vi konsentas p*
*Vi konsentas. Ĉu ne vere? Ho, konsentu*

*Ho, imagu vi la ravon esti supren altlevita*
*Esti kun omar' kunulo for en maron forĵeti*
*"Ne! Tro longen!" diris la limak', sku*
*"Mi ne volas." Al merlango do rifuzis li*
*Ja konsenti li ne volis, li ne povis partopre*
*Ja konsenti li ne povis, li ne volis partopre*

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTE